Grazie CII PASKA DIMANĈO – 11a de Aprilo 2010

POST OK TAGOJ JESUO VENIS - Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Joh. 20, 19-31

Kiam do estis vespero en tiu sama tago, la unua de la semajno, kaj kiam estis fermitaj la pordoj, kie la disĉiploj estis, pro timo antaŭ la Judoj, Jesuo venis kaj staris meze de ili, kaj diris al ili: Paco al vi. Kaj dirinte tion, li montris al ili siajn manojn kaj sian flankon. La disĉiploj do ĝojis, vidante la Sinjoron. Jesuo denove diris al ili: Paco al vi; kiel la Patro sendis min, tiel ankaŭ mi vin sendas.

Kaj dirinte tion, li elspiris sur ilin, kaj diris: Ricevu la Sanktan Spiriton: kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estas pardonitaj; kies vi retenos, ili estas retenitaj.

Sed Tomaso, unu el la dek du, nomata Didimo, ne ĉeestis kun ili, kiam Jesuo venis. La aliaj disĉiploj do diris al li: Ni vidis la Sinjoron. Sed li diris al ili: Se mi ne vidos en liaj manoj la truon de la najloj, kaj se mi ne metos mian fingron en la lokon de la najloj, kaj ne metos mian manon en lian flankon, mi tute ne kredos.

Kaj post ok tagoj la disĉiploj denove estis interne, kaj Tomaso kun ili. Kaj Jesuo venis, kiam la pordoj estis fermitaj, kaj staris en la mezo, kaj diris: Paco al vi. Tiam li diris al Tomaso: Etendu ĉi tien vian fingron kaj vidu miajn manojn; kaj etendu vian manon kaj enmetu ĝin en mian flankon; kaj ne estu nekredema, sed estu kredanta. Tomaso respondis al li kaj diris: Mia Sinjoro kaj mia Dio. Jesuo diris al li: Ĉar vi vidis min, vi kredas; feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis, kaj tamen kredas.

Jesuo faris antaŭ la disĉiploj multajn aliajn signojn, kiuj ne estas skribitaj en ĉi tiu libro; sed ĉi tiuj estas skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo estas la Kristo, la Filo de Dio, kaj ke kredante, vi havu vivon en lia nomo.

Ne sufiĉas scii ke Jesuo resurektis, oni devas elprovi Lin resurektinta. Tio estas kion Sankta Johano la evangeliisto priskribas al ni en sia Evangelio ĉe la ĉapitro 20a, versegoj 19-31.

“Vespere en tiu sama tago”, en la tago de la resurekto de Jesuo, temas pri la “tago unu” kaj ne pri “la unua tago de la semajno”; la evangeliisto skribas ‘unu’ ĉar li referencas al la kreo, al la tago unu de la kreo, do, en la resurekto de Jesuo la evangeliisto vidas la novan kaj definitivan kreon, tiun kiu neniam plu havos finon.

“Kiam estis fermitaj la pordoj, kie la disĉiploj estis”, la difina artikolo indikas ĉiujn disĉiplojn; do, tiu ĉi mesaĝo ne direktiĝas nur al kelkaj homoj, sed ĝi estas direktita al la tuta komunumo. “Pro timo antaŭ la Judoj, Jesuo venis kaj staris...” tiu estas la karakterizo de Jesuo, ke, kiam Li aperas al siaj disĉiploj, tiam Li aperas meze de ili, estas el tie ke radias la vivo, la amo al aliuloj.

Kaj la unuaj vortoj kiujn Jesuo komunikas al siaj disĉiploj kiam li ilin renkontas invitas ilin al plena feliĉo: “Paco al vi”, sed ne sufiĉas buŝa bondeziro, oni devas ĝin pravigi; jen kial Jesuo montras siajn manojn kaj sian flankon, nome li montras la restadon de la amsignoj pere de kiuj li oferdonis sian vivon por siaj disĉiploj.

Kaj la disĉiploj anstataŭigas la timon morti kiel Jesuo per granda ĝojo. Kial? Ĉar ili vidis ke la morto ne estingas la vivon sed permesas al ĝi ekburĝoni per nova, plena kaj definitiva formo.

Nu, Jesuo ripetas la bondeziron “Paco al vi”, kaj poste jen la tasko, la Patro sendis Jesuon por atesti pere de agoj la vivon de la Patro, nome por komuniki agojn kiuj transdonas vivon al la homaro, “Kiel la Patro sendis min, tiel ankaŭ mi vin sendas”, la tasko de la komunumo estas komuniki vivon pere de agoj kiuj redonas kaj riĉigas la vivon de la aliuloj.

Sed ne sufiĉas transpreni la taskon, oni bezonas eĉ la forton, jen kial la evangeliisto diras: “Dirinte tion, li elspiris sur ilin”; Jesuo elspiras sur la disĉiplojn ĝuste kiel la kreinto enblovis sur la unuan homon en la libro Genezo, kaj estas skribite ke “la homo fariĝis viva animo”. Nur kiam oni ricevas la Spiriton, nome la kapablon ami senkondiĉe la aliulojn, oni iĝas vivantaj estuloj.

“Kaj li diris al ili: “Ricevu Sanktan Spiriton”, ne la Sanktan Spiriton, en la origina teksto ĉi tie ne estas la difina artikolo; la komuniko de la Spirito flanke de Dio estas plena, tuteca, kaj ricevi tiun Spiriton dependas de la homoj, de ilia kapablo akcepti tiun ĉi amon.

Kaj jen la tasko kiun Jesuo donas, “Kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estas pardonitaj; kies vi retenos, ili estas retenitaj”, kion indikas Jesuo? Li ne donas povon al kelkaj homoj, sed li donas kapablon kaj respondecon al la tuta komunumo. La komunumo de Jesuo devas briligi la lumon de la amo kaj de la vivo.

Tiuj kiuj sin sentas altiritaj de tiu lumo partoprenante en ĝi, ili vidos la pekon, nome, sian maljustan pasintecon komplete forviŝita; tiuj kiuj, kontraŭe, eĉ vidante brili la lumon deturniĝos de ĝi, ili ĉiam pli kaŝiĝos sub la sfero de la mallumo, de la peko, kaj la peko restos sur ili ĉar, kiel diris Jesuo, kiuj malbonfaras tiuj malamas la lumon.

Nu, “Sed Tomaso, unu el la dek du, nomata Didimo”, la ĝemelo, ĉar li havas la samajn sentojn de Jesuo, li estas tiu kiu diris: “iru ankaŭ ni morti kune kun Li”, “li ne ĉeestis kun ili” kaj li krias la senesperan bezonon kredi. Tomaso eniris la historion kiel la nekredanta disĉiplo, verdire estas la lia la plej alta kredkonfeso en la tuta evangeliteksto, kaj ni scias ke li diras: “Se mi ne vidos en liaj manoj la truon de la najloj, kaj se mi ne metos mian fingron en la lokon de la najloj, kaj ne metos mian manon en lian flankon, mi tute ne kredos”.

“Post ok tagoj”, la indiko estas grava, ok estas la nombro de la resurekto, ĝi estas la cifero kiu indikas la nedetrueblan vivon, kaj tio okazas post unu semajno, nome kiam la komunumo celebras la eŭkaristion. Jesuo ne allasas personajn aŭ privatajn aperojn, sed estas en la eŭkaristio kiu li sin montras.

Nu, al Tomaso, al la komunumo de la disĉiploj Jesuo sin montras starante en la mezo kaj li revenas kun la bondeziro je pleno da feliĉo, “Paco al vi”. Kaj tie la evangeliisto diras ke “Jesuo venas”, ne ke Li “venis”, ĉar Jesuo venas, ĉiam li venas, li estas senĉese ĉe sia komunumo. Kaj poste li invitas Tomason fari kion li jam diris, nome enmeti la fingron en liajn vundojn.

Tomaso absolute sin detenas tion fari, sed li ekimpetas per la plej granda esprimo je fido kiu troviĝas en la tutaj Evangelioj. “Tomaso respondis al li kaj diris: Mia Sinjoro kaj mia Dio”. Do

Tomaso ne nur ne estis nekredema sed li estas tiu kiu rekonas en Jesuo la Dion, tiun Dion pri kiu Sankta Johano diris ĉe la fino de sia prologo: “lin neniu iam vidis”, Tomaso sciis Lin rekoni en Jesuo.

Nu, Jesuo proklamas la duan feliĉon de sia Evangelio, la unuan li proklamis post la piedlava rito. La unua estis tiu kiam Li diris: “Feliĉaj vi estas se tion vi faras, nome se vi amos la aliulojn ilin servante”, nun la alia feliĉo estas strikte ligita al la unua : “Feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis, kaj tamen kredas”.

Kiu praktikas amon kiu fariĝas servado al la aliuloj, tiu ĉi estas feliĉa ĉar li enmetas en sin mem vivkvaliton kiu estas sama al tiu de Dio mem kaj li povas sperti la ĉeeston de Kristo viva kaj vivdonanta. Oni ne bezonas vidi por kredi, tamen kiu kredas tiu vidas. Tia estas la defio de Jesuo kiun la evangeliisto relanĉas al ni.

La evangeliisto finas tiun evangelipecon dirante ke “Jesuo faris antaŭ la disĉiploj multajn aliajn signojn, kiuj ne estas skribitaj en ĉi tiu libro”. Kion tio signifas? Tiu ĉi estas nia sperto, tion oni skribis en tiu ĉi libro, por ke vi skribu la vian kaj ĝin riĉigu per via sperto. “Sed ĉi tiuj agoj estas skribitaj”, diras Sankta Johano la Evangeliisto, “por ke kredante” je tiu ĉi Dio kiu amas la vivon kaj je Sia filo Jesuo “vi havu vivon”.

Kaj li uzas la grekan terminon kiu indikas la eternan vivon, la vivon kiu kapablas superi la morton, “en lia nomo”. Kaj per tiu bondeziro finiĝas tiu evangelipeco.